

Humphrey Tonkin

University of Hartford, Usono / USA

Esperanto: esploraj prioritatoj

Resumo: En sia komenco, Esperantologio, la studado de la fenomeno Esperanto, traktis ĉefe la lingvon. Sed Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto, kreis, helpe de la unuaj adeptoj, ne nur lingvon sed ankaŭ komunumon kun akompanaj kulturaj kaj historiaj valoroj. Sekve, paralele kun la ekspansio de la Esperanto-movado, la studkampo Esperantologio iom post iom vastiĝis por inkluzivi historion, sociajn movadojn, literaturon kaj aliajn kampojn, inkluzive de la vivo kaj ideoj de Zamenhof. Interlingvistiko, la kompara studo de la lingvaj kondiĉoj por universala aŭ internacia lingvo, restis ĉefe lingvistike bazita kaj asociiĝis kun la multaj projektoj por ideala tutmonda lingvo aŭ helplingvo. Hodiaŭ, Esperantologio havas siajn apartajn instituciojn kaj apartajn aliojn al la fenomeno Esperanto: ili inkluzivas ne nur lingvistikon, sed socilingvistikon, etnografion, historion, literaturon kaj abundajn aliajn temojn, inkluzive la evoluon de la skriba kaj parola lingvo tra pli ol 130 jaroj. La nuna artikolo donas mallongan superrigardon de Esperantologio kaj ĝiaj branĉoj, kaj proponas prioritatojn por la estonteco. Eĉ se oni konsentas, ke la kampo vastiĝas kaj riĉiĝas, tamen la enpenetro de Esperanto kiel studobjekto en la diversajn disciplinojn restas nesufiĉa: Esperantologoj devas turni sin ankaŭ eksteren.

Ŝlosilvortoj: Esperantologio; Interlingvistiko; Sociaj movadoj; Literaturo; Zamenhof.

1 Enkonduko

Indas, ke la revuo *Esperantologio / Esperanto Studies*, nun en nova periodo de eldoniĝo, reekzamenu la prioritatojn por la disciplino Esperantologio. Samtempe indas noti, ke antaŭ precize cent jaroj (plus unu jaro, tamen), Eugen Wüster, rigardata kiel la fondinto de la disciplino terminologio, publikigis en la revuo de Teo Jung *Esperanto Triumfonta* (poste *Heroldo de Esperanto*) artikolon pri la “ĝis nun embrie ekzistanta scienco” Esperantologio (Wüster 1978: 17). Tion farante, li kvazaŭ ŝtelis de la Idistoj kaj ties posteuloj la sciencan aliron al la fenomeno Esperanto – sed ne kiel post-Idistan postkuron de ia ideala interlingvo sed kiel praktikan disflorigon de jam ekzistanta lingvo laŭ kiel eble plej internaciaj kaj lingvistike pravigeblaj kriterioj, prenante en konsideron la jam faritan progreson.

En la komenco, do, Esperantologio estis – laŭ Kalocsay, kiu citis Wüster en sia kontribuo al la *Enciklopedio de Esperanto* sub la temo *Esperantologio* – “la

speciala Esperanta lingvistiko, okupiĝanta pri vortkonstruo, vortkunmeto, vortenkonduko, transskribo de internaciaj fakvortoj kaj de propraj nomoj” (Kalocsay 1934 [1979]: 126). Kalocsay atentigas, ke temas ne simple pri scienca aliro sed pri ia kompromiso, aŭ ekvilibro, inter, unuflanke, principoj (bazaj reguloj), kaj, aliflanke, la natura evoluo de la lingvo. Iasence, tiu streĉiteco, tiu tensio, inter planiteco kaj libera kresko restas kerna al la disciplino – kaj al la lingvo mem. Li klopodis tion esprimi en du lingvistikaj aŭ parte lingvistikaj verkoj, *Parnasa Gvidlibro*, verkita kun Waringhien kaj eldonita en 1932, kaj *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*, same kunaŭtorita kun Waringhien kaj eldonita en 1935 (vidu ankaŭ Kalocsay 1938 kaj Kalocsay 1966). La *Gvidlibro* konservas sian aktualecon ĝis hodiaŭ, la *Plena Analiza Gramatiko* malpli (vidu prefere Wennergren 2005, 2020). La scienca tereno de Esperantologio tute nature ekspansiis de tiam ĝis hodiaŭ, por inkluzivi ne nur lingvistikon sed ankaŭ historion, sociologion – fakte la sociajn sciencojn ĝenerale – kiel ankaŭ la literaturon kaj aliajn kulturajn fenomenojn. Sed jen, unuflanke, la emfazo de Esperanto kiel unika fenomeno kaj jen, aliflanke, la aserto, ke Esperanto estas lingvo kaj kulturo kiel ĉiuj aliaj lingvoj kaj kulturoj: tiu kontrasto restas kerna al Esperantologio.

Tro malofte oni haltas por iom superrigardi la terenon. Jen la celo de la nuna artikolo, kiu tamen estas nur tre supraĵa pritrakto verkita grandparte surbaze de mia kontribuo al la 40a Esperantologia Konferenco dum la Universala Kongreso de Esperanto en Seulo en julio 2017, kun kelkaj ĝisdatigoj. Oni legu ĝin kiel prolegomenon al la pli detala kaj estontecen rigardanta artikolo de mia kolego Guilherme Fians en tiu ĉi numero de *EES* (Fians 2022).

2 Lingvo – socio – kulturo

La fenomenon Esperanto oni povas rigardi el pluraj vidpunktoj, ekzemple: kiel lingvon, kiel socian movadon, kiel kulturan fenomenon (Janton 1988, 1993; Tonkin 2006).

La eksterstaranto al Esperanto verŝajne rigardas Esperanton unuavice kiel lingvan eksperimenton – klopodon krei kaj konstrui lingvon por internacia uzado. Antaŭ pli ol unu jarcento, Couturat kaj Leau proponis super-rigardon de planlingvoj en sia duvoluma verko en la franca lingvo (1903, 1907). La granda debato de la unuaj jardekoj de la 20-a jarcento koncernis unuavice la *lingvajn* komponentojn de internacia lingvo: tio kondukis al la Ido-skismo de 1907. Tiun skismon oni povus rigardi kiel tragedion aŭ kiel iaspecan elsaviĝon: la intelektuloj kiuj serĉis (kaj daŭre ne trovis) idealan lingvon iris unu vojon (kie ili bele debatis diverslingve inter si, sen veni al ĝenerale akceptita solvo), dum la movadanoj esence malakceptis lingvajn

reformojn al Esperanto, firmigis siajn celojn, fondis asociojn, verkis, kaj traktis pri demandoj internaciismaj, ne nur lingvaj. Dum tiu epoko la termino *interlingvistiko* estis kreita, komence de la belgo Jules Meysmans en 1911 (Meysmans 1911; D. Blanke 2015b), sed pli formale de la dana lingvisto Otto Jespersen en 1931 (Shenton, Sapir kaj Jespersen 1931), por priskribi la komparan studon de planitaj lingvaj sistemoj.

Montriĝis, ke la intelektula serĉado de la ideala lingvo (reprezentata de la Idistoj) kondukis al sakstrato: oni multon eksciis pri lingvistiko sed malmulton eksciis pri internacia organizado de la ordinaraĵoj grupoj grupigitaj sub la standardo de internacia interkompreniĝo. Kontraste, Esperanto, sola inter la lingvaj projektoj, faris tiun salton al funkcia internacia lingvo (kiel klasike klarigis Detlev Blanke en pluraj verkoj, notinde 1985, 2006, 2018).

Resume: kiam en 1907 venis la apero de Ido kaj la sekva Ido-skismo, la Idistoj ne rekonis la potencon de la socia flanko de Esperanto. Zamenhof ne nur kreis lingvon: li kreis ankaŭ movadon, komunumon. Kaj, kiel mi lastatempe aliloke argumentis (Tonkin 2020: 20-21), li ankaŭ kreis pasintecan: en socia movado (ekzemple la esperantista), komunumo ekestas ne nur pro komunaj celoj sed ankaŭ pro komuna pasinteco, kiu estas kreita parte el la interkonsento kiu formis la komunumon jam en la komenco. Tion bone komprenas la teoriistoj pri naciismo kaj t.n. *imagitaj komunumoj* (Anderson 1983; Hobsbawm kaj Ranger 1983; Hastings 1997), kiuj emfazas la neceson inventi (aŭ “eltrovi”) historion kiu unuigu la koncernan komunumon (temo al kiu mi revenos). Esperanto restis fidela al si mem ne pro la supereco de tiu aŭ alia *lingva* trajto sed pro la lojaleco de la esperantistoj al komuna internacilingva ideo: la socia aspekto de Esperanto esence venkis kontraŭ la lingva aspekto. Ne nur tio: la unuaj adeptoj de Esperanto ne venis al io tute nova, sed al lingva fluo, kiun ili rekonis kiel jam antaŭe ekzistantan en la lingvoj de Eŭropo kaj esence ree eltrovitan de Zamenhof.

Interne de tiu socio, paralele kun ĝi, kreiĝis ankaŭ kulturo. Ne nur temis pri tio ke la esperantistoj konsistigis grupon kuntenitan de ideologia nocio, sed ke evoluadis komunaj kondutoj, tradicioj kaj artaj verkoj, produktoj de impulso evidenta preskaŭ de la komenco en la Zamenhofa revolucio (kiel Auld 1986 nomis ĝin). Zamenhof mem verkis poemojn, tradukis grandajn verkojn de la okcidenta kulturo, tradukis ankaŭ la Malnovan Testamon. Lin aparte interesis proverboj. La esperantistoj sekvis tiun gvidon. Ekestis Esperanto-kulturo.

Apenaŭ necesas aldoni, ke traduki estas eltrovi kaj adapti ion jam ekzistantan. Same pri proverboj. Zamenhof laboris por krei lingvan lokon kie la klasikaj verkoj de la monda kulturo kuniĝu. Vortoj, leksemoj (en la kazo de Esperanto, radikoj) havas signifon. Tiun signifon (paradokse) ili havas

pro tio, ke ili jam havis ĝin: lingvoj estas retrospektivaj. Unu el la grandaj problemoj en kreado de komunumo, precipe planlingva komunumo, estas plani tiun pasintecon kiu donas signifon al la nuntempo. Tion Zamenhof atingis ekzemple per utiligo de jam ekzistantaj semantikaj sistemoj (ĉefe en la lingvoj de Eŭropo) kiam li kreis sian radikaron, kaj per ligo inter Esperanto kaj la eŭropa kulturo, kiun li kreis per sia ambicia literatura traduka programo. Ĝis hodiaŭ, tiu programo, almenaŭ parte, trabatis siajn eŭropajn limojn (do, siajn Zamenhofajn limojn) kaj fariĝis tutmonda. Fakte, jam en plej fruaj jaroj de la 20-a jarcento la influo de Esperanto establiĝis ankaŭ ekster eŭropaj kulturoj, ekzemple en Ĉinio kaj Japanio: la lingva scio de Zamenhof estis, tute nature, limigita – sed tio ne nepre malhelpis la ekspansion de Esperanto preter tiuj geografiaj kaj lingvistikaj limoj (Miyamoto 1977; Lins 2008a; Konishi 2013, 2015; inter aliaj).

Tiu procedo de internaciigo similas, sed iasence inversigas, fenomenon notitan de samtempulo kaj aliancano de Zamenhof: la pola lingvisto Jan Baudouin de Courtenay (1845-1929), kiu argumentis kontraŭ la memstaro de lingvoj. Lingvoj, laŭ Baudouin, ekestas el elementoj jam ekzistantaj en aliaj antaŭe ekzistantaj lingvoj. Sekve, ĉiuj lingvoj jam ekzistas embrie en aliaj lingvoj kaj ekestas kiel memstaraj pro politikaj kaj ne pro lingvistikaj kialoj: individua lingvo “estas ilo kaj aktivado” (Baudouin de Courtenay 1972; Young 2016).

3 Movado

La esperantistoj elektis uzi sian lingvon laŭ diversaj kaj specifaj manieroj. En la fruaj jaroj oni observas multan emfazon je praktika uzo: verkado de komerca korespondado, starigo de fakaj kontaktoj. Samtempe, la Esperanto-publiko komence rezistis centran organizigon. Tiu rezisto eble rezultigis perdon de fokusita energio precipe en la disvastigo de la lingvo, sed (manke de io alia) ĝi fortigis organizajn strukturojn ĉe la bazo – lokaj kluboj kaj neformalaj kursoj, ekzemple. Formiĝis kulturaj normoj, neformalaj kontaktoj. Nur en la komenco de la 20-a jarcento oni fondis internaciajn Esperanto-instituciojn: la Akademio (komence la Lingva Komitato) datiĝas de 1905 (Minnaja 2018), UEA de 1908 (kiam Esperanto estis jam 21-jara: Lins 2008b; van Dijk 2012).

La unuaj uzantoj de la lingvo elektis uzi ĝin por certaj agadoj, malpli por aliaj agadoj. Okazis lingvaj debatoj (por ne diri disputoj), sed la fruaj uzantoj observis certajn normojn. La fortoj kiuj puŝis la esperantistojn al la lingva centro superpezis tiujn kiuj puŝis ilin al la periferio. Surbaze de la skriba lingvo, ekestis iom post iom normoj de parola lingvo – malmulte konataj hodiaŭ ĉar tiu estis periodo antaŭ la elektronaj registraj rimedoj de

hodiaŭ. Iom da lingva arkeologio por elfosi la fruan parolan lingvon povus esti vere utila. Ĝi estus certagrade eltrovebla en fruaj sonregistroj kaj en la tekstoj de teatraĵoj. Tiel, do, ekestis tekstaj normoj kaj teksta tradicio, kaj same parolaj normoj kaj parola tradicio. Aldoniĝis instituciaj normoj.

Studioj de la Esperanto-movado estas relative abundaj. Multaj estas amatoraj kompilaĵoj de faktoj aŭ historiaĵoj, multaj argumentas por aparta vidpunkto (Privat 1923 kaj 1927 kaj la centrecio de la t.n. neŭtrala movado; Drezen 1931 kaj la internacia laborista movado; Lapenna kaj aliaj 1974 kaj la ŝlosila rolo de la moderna UEA), sed, precipe en la nuna tempo, multaj ekzamenas la movadon aŭ iujn el ĝiaj integraj elementoj kun iom da objektiva distanco. Mi menciuj la laboron de Lins (2008b) kaj van Dijk (2012) pri UEA, kaj Lins (2016a, 2016b) pri la intermilita Esperanto-movado. Ofte ilia vidpunkto estas pure interna (UEA en la Esperanto-movado), foje ĝi prenas en konsideron la politikan ĉirkaŭaĵon, kiel ekzemple Miyamoto (1977) pri la japana Esperanto-movado kaj Lins (2016a, 2016b, 2017) pri la intermilitaj persekutoj kontraŭ esperantistoj.

Kaj kompreneble estas ankaŭ verkoj kiuj konsideras la Esperanto-movadon pure elekstere, precipe en la kunteksto de la internacilingva ideo (Garvía 2015; Gordin 2015), aŭ la vivo de Zamenhof (Privat 1920; Boulton 1962; kaj pluraj aliaj).

4 La ekstera rigardo al Esperanto

En la fruaj tagoj, kaj ankaŭ hodiaŭ, eksterstaranto povus konsideri la Esperanto-komunumon esence kiel grupon de eksperimentantoj pri planita lingvo. Oni povas demandi sin ĝis kiu grado la adeptoj de Esperanto konsistigis aŭ konsistigas koheran ideologian grupiĝon. Homoj venas al Esperanto, kaj, pli grave, restas ĉe ĝi, pro multaj ŝajne malsamaj motivoj. Ĉu ekzistas komunaj trajtoj inter la praktikantoj de Esperanto (fakte: ĉu Esperanto estas io kion oni *praktikas* aŭ kion oni simple *parolas*)? Unuflanke ni esperantistoj fieras pretendi, ke Esperanto estas uzebla kaj uzata por absolute ĉio; aliflanke ni postulas de niaj kolegoj komunecon de agado kaj kredado. Ĉu la frazokomenco, “La esperantistoj kredas, ke...” estas konvinke kompletigebla?

La Esperanta socia movado ekestis en la finaj jaroj de la 19-a jarcento – periodo de intensa internaciismo en certaj medioj, de ekesto de sociaj organizaĵoj, de ekfloro de la paca movado. Indas rigardi Esperanton kiel unu socian movadon inter multaj: niaj historiistoj, tute nature (kaj precipe en la fruaj jaroj) emis verki aŭ kompili historiojn de Esperanto mem, ne de Esperanto kiel unu inter multaj tiutempaj sociaj movadoj. Tio nun komencas ŝanĝiĝi: vidu ekzemple Künzli (2006), Chrdle (2019), Alcalde kaj Salguero

(2018) kaj kuntekste situatajn verkojn de kaj pri Hector Hodler: Englert (2020), Hodler (2020). Krome, pli da eksterstarantoj komencas interesiĝi pri la fenomeno Esperanto kaj trakti ĝin serioze (ekzemple O’Keeffe 2021). Grava frua paŝo tiudirekten estis la verko de Umberto Eco (1993) pri la serĉado de la perfekta lingvo, kiu esence lokis Esperanton en la fluon de la historio de ideoj (eĉ se ĝi sidas iom malkomforte inter la postkurantoj de perfekteco: malmultaj seriozaj pensantoj/uzantoj pri Esperanto asertus ke ilia lingvo perfektas, nur ke ĝi bone funkcias).

Same eblas rigardi Esperanton kiel unuan klopodon en la nuntempa mondo krei postnacion internacion kulturon. En la anglalingva mondo aktuale okazas vigla debato pri tio, ĉu pere de la angla lingvo aŭ translingve ekestas tutmonda kulturo, kun tutmondaj kulturaj produktoj, tutmondaj kulturaj formoj (Apter 2013; Kirsch 2016; Young 2016). Aŭtoroj nedenaske parolantaj la anglan lingvon diskutas la efikon de transiro el ankra loka lingvo al lingvo de internacia komunikado en kiu nedenskuloj pli kaj pli akceptiĝas. Aliflanke, nova ondo de naciismo kontraŭbatalas tiun internaciismon kiu, laŭ multaj kritikoj, avantaĝis certan kaston kaj obstaklis la ordinarajn homojn.

Antaŭ pli ol dudek jaroj, Pool kaj Fettes (1998), esprimante la tiaman vidpunkton de Esperantic Studies Foundation (ESF) – kaj certagrade la nunan – verkis artikolon pri la nocio de interlingvismo. Ili demandis sin (kaj la legantojn) ĉu dezirindas “interlingva mondo” – tio estas mondo en kiu ekzistu (ĉio samtempe) altaj niveloj de lingva diverseco, lingva integriĝo, lingva egaleco, kaj lingva efikeco. Esence ili argumentis, ke eblas krei metodojn por superi lingvan diversecon, samtempe konservante tiun diversecon kaj la sentojn de identeco, lokeco kaj kultura aparteco kiuj akompanas ĝin (tiaj valoroj gravas en mondo kie la risko de homogeneco daŭre minacas nin). Tiu kombino de multlingvismo kaj unulingvismo animas la nuntempan laboron de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj, ekzemple: ĝi kombinas la rajton uzi la propran lingvon en egaleco kun aliaj lingvoj kaj la utiligon de neŭtrala superponta lingvo.

En sia verko, Pool kaj Fettes menciis kvin vojojn al interlingvismo, kiuj respondas al certaj tiuj postuloj sed ne nepre ĉiuj:

1. Monda angla lingvo
2. Esperantismo
3. Lingva perado (homa tradukado, interpretado)
4. Plurlingvismo (universala scio kaj uzo de pli ol unu aŭ du lingvoj)
5. Teknologismo (utiligo de maŝinoj por superi lingvan diferencon, do lingvajn barojn)

El tiuj kvin, nur Esperantismo (ili asertis) respondas al ĉiuj bezonoj – precipe efikeco kaj justeco. Tamen, ili argumentis, ke ne sufiĉas aserti tion: necesas la fundamentaj esploroj kiuj montru samtempe la malfortojn de la nuntempe plej aplikataj sistemoj kaj la fortojn de esperantismo. Ne sufiĉas aserti, ke Esperanto funkcias: necesas pruvi ke ĝi funkcias pli bone ol aliaj solvoj. Verdire, plej realismaj egalecaj solvoj postulus kombinaĵon de rimedoj; ekzemple, la grandegaj paŝoj nuntempe farataj de teknologismo (precipe artefarita inteligento) meritas zorgan atenton de la proponantoj de esperantismo.

La insisto de Pool kaj Fettes, ke necesas reiri al fundamentaj demandoj, ricevis intertempe konsiderindan atenton. Mi ne scias ĝis kiu grado tio estas atribuebla al la esperantistoj – verŝajne nur minimume. Sed Esperanto-parolantaj fakuloj certe akompanis tiun procedon. La demando pri lingva justeco ricevis tra la pasintaj dekkvin jaroj amason da atento (vidu ekzemple Tonkin 2015). Kelkaj ĝiaj ĉefaj esplorantoj havis kontakton kun esperantistoj, ekzemple en la Nitobe-seminarioj organizitaj ĉiun trian aŭ kvaran jaron de ESF, kutime kunlige kun Universalaj Kongresoj de Esperanto (lastatempe tiaj seminarioj okazis ekzemple en Tokio, Vilno, Prago, Rejkjaviko kaj Lisbono). Aliaj demandoj ricevis malpli da studado. Gravas, ke fakuloj dediĉu atenton al ili – kaj ankaŭ ke Esperanto-fakuloj atentu la progreson jam faratan rilate lingvan justecon kaj aliajn esencajn demandojn (ekzemple rilate al lingva teknologio).

La demando pri la rolo de la angla lingvo estas ĉiutage pli urĝa. La Nitobe-seminario en Rejkjaviko estis dediĉita al la kreskanta uzo de la angla lingvo kiel lingvo de instruado ankaŭ en neanglalingvaj landoj (Hultgren, Gregersen kaj Thøgersen 2014; Salomone 2022). Haltigi tiun ĉi gigantan ekonomian forton ŝajnas esence neeble. Ĉu eblas ke Esperanto kaj la angla lingvo iel kunekzistu en la internacia scenejo?

Signifa helpilo en tia esplorado estas la revuo *Language Problems and Language Planning (LPLP)*, multlingva revuo eldonata de CED, kiu donas decan atenton al Esperanto kaj planlingvoj sed ankaŭ al tiuj ĉi pli vastaj demandoj. Mi aldonu, ke *LPLP* ne ricevadas sufiĉan materialon pri interlingvistikaj demandoj nek pri Esperanto specife. Ĝi estas prestiĝa revuo: niaj seriozaj fakuloj devus uzi ĝin pli multe.

5 La profesieca dimensio

Reiro al la fundamentoj – do demandi “Kial Esperanto?” – estas esenca. Sed kio pri la studado de Esperanto mem? Ĉi tie necesas fari ioman distingan inter amatora kaj profesia laboro. Per “amatora” mi ne nepre celas “malpli profesieca”: ekzistas en niaj rangoj sindediĉaj esperantistoj kiuj parkeris kaj

studis ĉiun elementon, ĉiun nuancon, de la Esperanto-lingvo, kaj ne celas rilatigi ĝin kun aliaj pli vastaj aŭ apudaj fenomenoj. Ili ludas nepre utilan rolon, kaj ilia laboro elstaras en la historio de esperantologio. Tamen, studoj kiuj povas trovi vojon al ĉefaj fakaj revuoj kaj altnivelaj eldonejoj estas malpli multaj. Parte oni devas labori por superi antaŭjuĝojn pri Esperanto – sed tiuj antaŭjuĝoj draste falis tra la pasintaj tridek jaroj, parte pro tio, ke la aliro al lingvoj ŝanĝiĝis ĉe specialistoj pri lingvistiko kaj socilingvistiko. La iama faka aliro al lingvoj estis esence pere de normaj lingvoj, altprestigaĵaj denaskaj lingvoj. Lingva sociologio aŭ socilingvistiko havas historion de iom pli ol 50 jaroj; ĝi estas bazita ne sur teoriaj supozoj pri normaj lingvoj sed sur lingva konduto, lingva behavioro. En tiu kunteksto, Esperanto ja estas nur lingvo inter aliaj lingvoj, aŭ lingvaĵo inter aliaj lingvaĵoj. Sed en tiu vorto “nur” kuŝas grava vero: Esperanto estas egale merita je studado kiel ĉiuj aliaj lingvaj fenomenoj. Pri tiu realo ne ĉiu fakulo konsciiĝas. Bonaj lastatempaj esceptoj estas ekzemple anglalingva kaj franclingva republikigo de klasika verko de René de Saussure pri la formado de vortoj en Esperanto (Anderson kaj de Saussure 2018) kaj franclingva kolekto de interlingvistikaj kaj esperantologiaj eseoj redaktita de Moret (2019; vidu ankaŭ Collinson 2019).

Gravegas, ke niaj instancoj – CED, ESF, la interlingvistika katedro en la Universitato de Amsterdamo, la interlingvistikaj studoj en Poznano, la unuopaj universitatoj kiuj fake okupiĝas pri aspektoj de Esperanto, la landaj interlingvistikaj instancoj (ekzemple GIL en la germanlingvaj landoj) – vekigu al tiu realo kaj konvinku fakulojn ek esplori. Okulfrapa ekzemplo de tio (sed bedaŭrinde ankoraŭ escepto) estas la Universitato Princeton en Usono, kie establitaĵaj profesoroj studas aspektojn de Esperanto (Gordin 2015; Schor 2015) kaj la universitata biblioteko komencis amasigi Esperanto-kolekton. Pliaj ekzemploj estas kelkaj esplorbibliotekoj tra la mondo, kiuj vartas siajn kolektojn – unuavice la Aŭstria Nacia Biblioteko en Vieno, sed ankaŭ ekzemple la Brita Biblioteko en Londono, la Biblioteko de la Usona Kongreso en Vaŝingtono, kaj la biblioteko de la Universitato de Masaĉuseco, Amherst. Mi aldonu, ke necesas *utiligi* tiujn kaj aliajn kolektojn por fari seriozajn esplorojn – kaj tiel instigi la instancojn daŭrigi. Same, necesas *utiligi* la ĉiam multiĝantajn retajn rimedojn por esplori Esperanton, ekzemple la korpuson kiun prizorgas ESF (Tekstaro de Esperanto, projekto de Bertilo Wennergren), la kreskantan nombron de enretaj libroj kaj studoj, retajn vortarojn, k.s.

Kaj necesas disvastigi informojn pri faritaj kaj farataj studoj. La bibliografio de Modern Language Association (MLA) estas unu fonto de informoj pri publikigitaj studoj, kvankam malpli ĝisdata en plej lastaj jaroj. CED kaj ESF daŭrigas la laboron de Detlev Blanke per redaktado kaj aperigo

de retaj informiloj *Informilo por Interlingvistoj* kaj nun ankaŭ *Information for Interlinguists* (redaktitaj esperante kaj angle de Simon Davies). En la serio aperis indekso (sur 150 paĝoj) de la 99 numeroj de *Informilo por Interlingvistoj* redaktitaj de Blanke.

Ni estas sur la ĝusta vojo: multiĝas la seriozaj studoj de Esperanto – kaj en Esperanto kaj en aliaj lingvoj. Altiĝas la normoj: daŭre aperas iom amatoraj studoj, sed pli oftas la seriozaj. Sur tiu kampo, signifan rolon ludas kaj ludis la revuo *Esperantologio / Esperanto Studies*, ĝis antaŭnelonge redaktata de Christer Kiselman kaj nun aperanta en nova formo, kaj rete kaj papere. Paralele kun tiu nova formo ni havas niajn Esperantologiajn Konferencojn – ĉiujare preskaŭ seninterrompe de post la jaro 1977. Iliaj ĉefaj motoroj: la karmemora Detlev Blanke, Jonathan Pool, kaj nuntempe Guilherme Fians.

Kaj ni havas la elstaran laboron de la fako pri interlingvistikaj studoj ĉe Poznano, sub gvido de prof. Ilona Koutny – kiu dum pluraj jaroj redaktis la revuon *Język Komunikacja Informacja* kun ties ofta aperigo de interlingvistikaj kaj esperantologiaj artikoloj, kaj kiu nun gvidas novan serion *Cross-Linguistic and Cross-Cultural Studies* (Koutny, Stria kaj Farris 2020, 2021). Fine gravas menciigi verkojn direktitajn esence por pretigi esperantistojn por efike instrui la lingvon kaj situi ĝin en la disciplinon interlingvistiko, kie rolas respektive Katalin Kováts (2020) kaj Věra Barandovská-Frank (2020).

Sed, kiel atentigas Fians ĉi-numere, ni ankoraŭ ne plene sukcesis krei tiun senton de streĉiteco, en kiu ĉiu kontribuo al la fako estas metita sub la lupeon de la scienco, fare de homoj kiuj bone konas la temon kaj estas pretaj malkonsenti inter si en la nomo de pli bona kaj pli profunda esplorado – kaj, cetere, en la nomo de la propra scienca fako kaj ties etendiĝo preter kaj ekster la rondoj de Esperantujo.

6 La tempa dimensio

Tio kion Zamenhof kreis en la jaro 1887 kaj tio kio praktikiĝas en la jaro 2017 ne estas samaj. Unuavice, la lingvo mem ŝanĝiĝis. Mankas bonaj lingvaj kaj stilistikaj studoj pri tiuj ŝanĝoj en praktiko: ili malmultas por la skriba lingvo, mankas por la parola. Kompreni ilin pli bone estus kontribuo al la Esperanto-kulturo, sed eĉ pli granda kontribuo al la diakronaj lingvistoj kiuj studas la evoluon de lingvoj. Kion ni povas lerni pri la evoluo de lingvoj, kaj pri lingvoŝanĝiĝo, per studado de la evoluo de Esperanto – kaj kiel ligi la du? Temas ne nur pri skriba lingvo sed, eĉ pli, pri parola – notu la lastatempan verkon de Sabine Fiedler kaj Cyril Robert Brosch (2022) pri i.a. la parola lingvo. Kaj ligita al tiu demando estas ne nur la evoluo sed ankaŭ la evoluigo de Esperanto, sur la kampo de terminologio (ekzemple W. Blanke 2013). Bedaŭrinde la rolo de la Akademio de Esperanto rilate

kontrolon de la lingvoevoluo kaj esploradon pri la lingvoevoluiĝo restas plorinde minimuma.

Se temas pri la lingvokomunumo kiel tuto, interesaj rilataj studoj estas tiuj de Kimura Goro (2010, 2012), japana socilingvisto, kiu komparis la movadojn por la revivigo kaj evoluo de lingvoj de malplimulto (ĉefe la kornvala kaj la soraba) kun la evoluo de la Esperanto-movado, ĝiaj internaj streĉitecoj, kaj ĝiaj klopodoj elkonstrui la lingvon.

Per studo de Esperanto kiel tuto, oni povas lerni pri la leĝoj de lingvoŝanĝiĝo ĝenerale. Kiuj estis kaj estas la agentoj de lingvoŝanĝiĝo en Esperanto – kaj kiuj etnaj lingvoj plej multe influis tiun evoluon? Mankas studoj. Jes, ekzistas iom da etimologia studado (kaj etimologiaj vortaroj, precipe tiu de Vilborg 1989-2001), sed esence nenio serioza pri semantiko aŭ pri lingvouzo – sed vidu Fiedler kaj Brosch (2022).

Kaj kio pri la ŝanĝiĝantaj vidpunktoj pri Esperanto kaj pri la mondo ĝenerale inter esperantistoj? Kiel ili ŝanĝiĝis; kaj kiel, tra la tempoj, la mondo ekster Esperanto havis sian efikon je la mondo ene de Esperanto? Kiel evoluis kulturaj valoroj, kaj kiel tiuj valoroj esprimiĝis en la evoluanta literaturo, kaj aliaj kulturaj formoj, en Esperanto?

7 La *samtempa* dimensio

Studi la evoluon de ideoj pri Esperanto inter la esperantistoj estas aparte malfacile kiam detala dateno mankas. Kelkaj pioniraj socisciencistoj (Forster 1982; Rašić 1994; Stocker 1996; Galor kaj Pietiläinen 2015; Puškar 2015; kaj lastatempe Caligaris 2016 kaj 2021; kaj Fians 2021) faris demografiajn kaj opiniajn studojn – sed ni bezonas multe pli.

Ĝenerale (kaj kun kelkaj elstaraj esceptoj en la ĵusa listo), eĉ se ni studas la Esperanto-*movadon*, ni emas ne studi la Esperanto-*komunumon*, do la kolektivon de uzantoj de Esperanto. En la nuna epoko de sociaj medioj, la konsisto de tiu kolektivo estas en stato rapide ŝanĝiĝanta – sed eble pli atingebla per retaj rimedoj. Kaj la uzantoj de Esperanto multiĝas, kvante sed ne nepre kvalite, pro novaj lernrimedoj kiel ekzemple la interretajn kursojn de Lernu kaj Duolingo.

Leviĝas en tiu rilato la demando de difino de parolanto de Esperanto. Iuj argumentas, ke esperantisto estas homo kiu aktive partoprenas la Esperanto-movadon; aliaj, ke esperantisto estas homo kiu scipovas Esperanton; ankoraŭ aliaj, ke esperantisto estas tiu kiu havas ioman scion de la lingvo eĉ se tiu ne aktivas; aliaj, ke esperantisto estas tiu, kiu deklaras sin esperantisto. Apenaŭ necesas emfazi, ke nombrado de la esperantistoj (ĉiam tre neekzakta procedo) povas draste oscili depende de la difino de la koncepto. Wandel (2015) trovas du milionojn da esperantistoj, aliaj kelkmilon. Wandel trovas kreskon de la nombroj, aliaj malkreskon.

Rilataj sinkronaj temoj kiuj bezonas pli da studado estas la kompara uzo de gramatikaj formoj en la parola lingvo (laŭ aĝo, nacia deveno, lingva deveno k.s.), neformala uzo de la lingvo (eventuale en diversaj cirkonstancoj: naciaj medioj, internaciaj medioj, inter junuloj, inter maljunuloj, inter eŭropanoj, inter neeŭropanoj), procedoj de lingvoakiro (formalaj, neformalaj) – kaj kompreneble la fama demando pri facileco/malfacileco de Esperanto kompare kun aliaj lingvoj, kaj la rilata demando pri la efiko de akiro de Esperanto rilate akiron de scio kaj de internaciistaj vidpunktoj ĝenerale.

Same, relative nestudataj kaj (laŭ mia opinio kiel observanto) gravaj elementoj de miskompreno estas la metalingvaj aspektoj de Esperanto: pragmatiko kaj konversacia stilo, konversacia distanco, gestoj, retorikaj formoj. Se homoj kune venas el la tuta mondo kaj ekuzas komune konatan internacian planlingvon, kiel ili negocu siajn homajn interrilatojn je mikroniveloj? Kion ni scias entute pri tiu procedo de lingva negocado, ĝiaj sukcesoj kaj malsukcesoj?

8 La skriba lingvo

La skriban lingvon oni povas pli facile studi diakrone ol la parolan, sed komparaj studoj diakronaj aŭ sinkronaj estas relative maloftaj. La literatura stilistiko ja ricevis iom da atento (ekzemple de Kalocsay kaj Waringhien 1932) – kvankam ne lastatempe – sed ĝenerale mankas komparaj studoj pri la skriba lingvo pli ampleksaj ol specifaj esploroj de specifaj cirkonstancoj.

Verko kiu klopodas doni superrigardon de unu aspekto de la skriba lingvo, nome la literatura, estas la historio de Esperanto-literaturo de Minnaja kaj Silfer (2015) – multe pli ambicia klopodo ol ĉiuj antaŭaj literaturhistoriaj studoj (de Kalocsay, Kralj, Auld, Boulton kaj pluraj aliaj). Fakte, ne ekzistas en Esperanto io komparebla: temas pri la unua tia superrigarda literatura historio en nia lingvo – post 130 jaroj da Esperanto-literaturo. Tio igas la verkon impresa kaj impona. Simple aŭdaci produkti tiel vastetendan verkon meritas admiron, kaj ne estas surprizo, ke la verko kreis certan mankon de unuanimeco en la Esperanto-movado – el kiu espereble venos novaj konkurencaj aŭ alividpunktaj studoj.

Aliflanke, la koncepto de la verko levas plurajn iom tiklajn demandojn. Mi iam argumentis, ke Esperanto-literaturo estas esence tradukita fenomeno (Tonkin 2020 kaj aliloke): eĉ la originalaĵoj estas certgrade filtrataj tra la naciaj konceptoj de la verkantoj, kiuj ĉiuj iasence pendas inter kreo de Esperanto-verkoj indaj al komparo kun naciaj verkoj kaj kreo de Esperanto-verkoj fidelaj al la formiĝanta Esperanta literatura tradicio. En tiu kunteksto, apartigi la originalan literaturon disde la tradukita neeviteble distordas la bildon (Minnaja kaj Silfer bone konscias tiun problemon kaj ne malatentas la

ligojn kun tradukita literaturo). Pli grave, verki tiajn literaturajn historiojn, bazitajn sur interkonsentitaj juĝoj pri kvalito kaj kanoneco signifas levi demandosignojn inter tiuj postmodernistoj, kiuj pridemandas tiujn kategoriojn. En tiun opiniuraganon brave marŝis Minnaja kaj Silber.

Tiuj internaj bataloj ne malfortigas la neceson verki pli da literaturaj studoj, se nur por distingi la trajtojn de la Esperanto-literaturo, ĝian direkton, kaj ĝian pliampleksiĝon. Same gravas atentigi la eksterstarantojn pri la ekzisto de tiu literaturo kaj la ebleco ligi ĝin al komparaj literaturaj studoj kaj al konceptoj de tutmonda literaturo (temo aparte aktuala nuntempe). La anglalingvaj verkoj de Geoffrey Sutton (2008) kaj de la bedaŭrata Paul Gubbins (2012) meritas mencion tiurilate – kaj jam delonge Esperanto havas sian lokon en la Enciklopedio Princeton pri Poezio kaj Poetiko (Tonkin 2012).

Same kiel Esperanto estas lingvo inter lingvoj – kaj necesas tion emfazi kaj studi – ĝi estas kulturo inter kulturoj, eble de alia speco, sed vigla kaj studinda.

9 Zamenhof kaj Zamenhofoj

Mi volas turni min al la demando pri prioritatoj por la estonteco, sed antaŭ ol fari tion, indas ĵeti rigardon al la eksterordinaraj atingoj en zamenhofologio. Ekde Privat oni verkis kaj verkas pri la vivo de Zamenhof – homo pri kiu ni scias multon (li skribis abundajn leterojn, faris multajn paroladojn, verkis originale kaj traduke, interagis kun amaso da figuroj en la Esperanto-movado) kaj konsternante malmulton (liaj pli personaj paperoj evidente perdiĝis en la jaroj post lia morto kaj la pereado de la familio; same la personaj memoroj malabundas). La bildo de Zamenhof prezentita en la biografiaj verkoj varias laŭ la periodo de verkiĝo, la personaj prioritatoj de la verkintoj, kaj la temoj akcepteblaj aŭ interesaj al la publiko.

La lastatempaj kontribuoj, komence de la impona biografio de Korĵenkov (2011), komplete ŝanĝis la bildon. Holzhaus (1969) kaj Maimon (1978) – kaj certgrade Boulton (1962) – estis la unuaj kiuj serioze esploris la judan kulturan fonon de Zamenhof, kaj Korĵenkov (2011) konstruis sian verkon sur tiun fundamenton. Künzli (2010), Garvía (2015), Schor (2015) kaj aliaj plukonstruis tiun bildon – reirante, kune kun Kiselman (ekz. 2008, 2009, 2010) kaj aliaj, ankaŭ al Homaranismo kaj la motivoj de Zamenhof. Iom post iom ekestas multe pli komplika kaj kompleta bildo, de grava pensulo, ido de sia tempo, produkto de aparta kultura situacio. Ni esperu, ke la altaj normoj kiujn starigis la lastatempaj zamenhofologoj havos efikon ankaŭ sur aliaj terenoj de la esperantologio.

10 Prioritatoj

Ni jam notis, ke en la pli ol 130 jaroj de sia ekzisto, Esperanto estis kaj estas studata el multaj vidpunktoj. Tamen, tiuj studoj okazis plejparte laŭ hazardo, laŭ la disponeblo de specialistoj, kaj je varia kvalito kaj intenseco. Foje ili moviĝas en cirkloj, kiel atentigas Fians ĉi-numere, citante Blanke (2015a). Kiel movadanoj rigardantaj al la estonteco, kiuj estu niaj prioritatoj se temas pri la scienca esplorado de la fenomeno? Kiujn kaj kiajn studojn ni bezonas por prosperigi la disvastigon de Esperanto kaj la sciencan atenton al la lingvo? Kiujn kaj kiajn fakulojn ni devas allogi al tiu studado? Kiel garantii kvaliton kaj objektiveton?

Almenaŭ partan respondon al tiuj demandoj liveras tre utila sed ne-sufiĉe konata libro redaktita de Christer Kiselman (2018) kiu konsistas el eseoj de fakuloj el diversaj disciplinoj laŭ la vidpunkto de tiuj disciplinoj: interlingvistiko (D. Blanke), pacismo (Alcalde), juro (Brosch), lingvoideologio (Kimura), literaturo (Minnaja), historio (Tonkin) k.s. Detlev Blanke mem verkis plurajn eseojn pri esploraj prioritatoj ankoraŭ aktualajn (2003, 2007, 2015a kaj aliaj).

Kiam CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj) estis fondita en la 1950aj jaroj, ĝi havis kiel celon stimuli esplorojn kaj dokumentadon kiu samtempe helpu al la Universala Esperanto-Asocio kompreni la ĉirkaŭaĵon en kiu Esperanto troviĝas (lingvaj problemoj, konscio pri tiuj problemoj, rolo de lingvoj en internaciaj aferoj, lingvopolitiko, lingvoplanado, lingva justeco, la efektiva situacio de la Esperanto-movado) kaj konvinku la eksterstarantojn, ke Esperanto meritas ilian atenton. Rekte aŭ nerekte, tiuj du celoj akiris konsiderindan sukceson. Estas nenia dubo, ke hodiaŭ ni havas pli bonan komprenon pri la komplikeco kaj komplekseco de la lingva situacio en kiu Esperanto troviĝas, kaj ke la statuso de Esperanto kiel objekto de serioza studado estas pli firma kaj pli alta ol antaŭe, eĉ se ne ankoraŭ plene akceptata.

Tiu laboro ne finiĝis. Unu el niaj ĉefaj devoj estas disvastigi inter esperantistoj, kaj precipe Esperanto-aktivuloj, la eltrovaĵojn kaj konstatojn kiuj okazas ekster Esperantujo koncerne lingvopolitikon kaj lingvojustecon, ekzemple, kaj adapti tiujn eltrovaĵojn al nia situacio. Tiu estas urĝa kaj signifa tasko. Izolitaj atingoj estas, ekzemple, la traduko de la angla al Esperanto de la libro de Phillipson (2004) pri Eŭropo, kaj la okazigo de la Nitobe-seminarioj, kiuj kunvenigas eksterstarantojn kaj esperantistojn. Sed restas multo por fari.

Dua, rilata tasko estas kontribui niajn spertojn al la ĝenerala scio pri lingvopolitiko, lingvoplanado, lingva justeco kaj rilataj demandoj. Pluraj el inter ni regule prezentas referaĵojn en neesperantistaj fakaj konferencoj

kaj verkas artikolojn en naciaj lingvoj; sed estas bezonata multe pli sistema laboro. Aldona tasko evidente estas altigi nian propran prestiĝon, same kiel esploristoj kaj kiel reprezentantoj de institucioj. CED estas unu el la kunvenigantoj de la ĉiujara novjorka simpozio ĉe Unuiĝintaj Nacioj, ekzemple – simpozio, kiu partoprenigas universitatanojn, UN-funkciulojn kaj diplomatojn.

Por fari ĉion ĉi necesas rimedoj. Esperantic Studies Foundation estas unu tia fonto. Ĝia programo de malgrandaj subvencioj estas administrata kaj funkciigata de CED; ĝia nova programo de stipendioj Boulton jam komencas doni fruktojn en la formo de esploroj kaj publikigaĵoj. Kvankam ESF sukcesas ĉiujare elspezi sian buĝeton, ĝi ne ricevas lavangon de proponoj por novaj esplorprojektoj, helpo pri vojaĝado por esploroj aŭ por ĉeesti konferencojn. Se estus pli da konkurenco, altiĝus la kvalito kaj eble ankaŭ la rimedoj, kiujn ESF disponigus.

Rilata sektoro estas la reta. Ju pli facile niaj esplorantoj povas aliri fontojn de informoj, faciligilojn de esploroj k.s., despli bone. Jam ekzistas multaj retaj rimedoj, sed ni bezonas pli. Ankaŭ tie ESF povas esti fonto de rimedoj por starigi novajn retajn servojn. Kaj ankaŭ gravas, ke niaj bibliotekoj fariĝu pli facile alireblaj, ankaŭ rete: sur tiu tereno laboras aktiva grupo de esperantistaj bibliotekistoj.

Kaj sur kiuj terenoj necesas esploroj? Esence ĉiuj. Mi havas miajn prioritatojn sed ili konsistas el personaj preferoj kaj ne povas esti rigardataj kiel objektivaj kaj definitivaj. Bezonataj esploroj inkluzivas studadon de la efektiva praktika lingvouzo, precipe rilate la parolatan lingvon. Universalaj Kongresoj estas brilaj lokoj por tia esplorado en internacia kunteksto. Kial ne abundas la esplorantoj en niaj kongresoj?

Unu mia prioritato estas kompreni Esperanton en la kunteksto de lingvopolitiko. Tio havas du flankojn: kompreni kiuj praktikoj en la ekstera mondo aplikeblas al Esperanto, kaj kompreni kiel plej bone integriĝi Esperanton en konsiderojn pri lingvopolitiko.

Plia prioritato estas loki Esperanton en la aktualan debaton pri tutmonda kulturo per studado de kulturaj valoroj en la Esperanto-movado kaj ekster ĝi. Ankoraŭ plia prioritato estas kompreni kiel la esperantistoj uzas sian konstruon de la pasinteco por gvidi sin en la estontecon.

Sed la ĉefa prioritato estas konvinki klerajn homojn, ke ili studu la fenomenon Esperanto kaj ĝian ĉirkaŭaĵon, tiel altigante samtempe nian scion pri Esperanto kaj la prestiĝon de nia unika lingvo.

Kaj vi? Kiuj estas viaj prioritatoj, kaj kion vi faras por realigi ilin?

Bibliografio

- Alcalde, J., Salguero, J. (Red.). (2018). *Antaŭ unu jarcento: La granda milito kaj Esperanto*. Paris: SAT-EFK.
- Anderson, B. (1983). *Imagined communities: Reflections on the origin and spread of nationalism*. London / New York: Verso.
- Anderson, S. R., Saussure, L. de (Red.). (2018). *René de Saussure and the theory of word formation*. Berlin: Language Science Press.
- Apter, E. (2013). *Against world literature: On the politics of untranslatability*. London: Verso.
- Auld, W. (1986). *Kulturo kaj internacia lingvo*. Chapecó: Fonto.
- Barandovská-Frank, V. (2020). *Interlingvistiko: Enkonduko en la sciencon pri planlingvoj*. Poznań: Wydawnictwo Rys & Uniwersytet im. Adama Mickiewicza.
- Baudouin de Courtenay, J. (1972). *A Baudouin de Courtenay anthology: The beginnings of structural linguistics*. E. Stankiewicz (Red. & Trad.). Bloomington: Indiana University Press.
- Blanke, D. (1985). *Internationale Plansprachen. Eine Einführung*. Berlin: Akademie-Verlag.
- Blanke, D. (2003). *Interlingvistiko kaj esperantologio: Vojoj al la faka literaturo*. Esperanto-Dokumentoj 39E. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Blanke, D. (2006). *Interlinguistische Beiträge. Studien zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen*. S. Fiedler (Red.). Frankfurt: Peter Lang.
- Blanke, D. (2007). Sprachenpolitische Aspekte internationaler Plansprachen. Unter besonderer Berücksichtigung des Esperanto. En D. Blanke, & J. Scharnhorst (Red.). *Sprachenpolitik und Sprachkultur* (p. 205-253). Frankfurt: Peter Lang.
- Blanke, D. (2015a). How not to reinvent the wheel: The essential scholarly literature in interlinguistics and Esperantology. *Interdisciplinary Description of Complex Systems*, 13(2), 200-215.
- Blanke, D. (2015b). Biografio de Jules Meysmans. *Informilo por Interlingvistoj* 24(92-93), 14-15.
- Blanke, D. (2018). *International planned languages: Essays on interlinguistics and Esperantology*. S. Fiedler, & H. Tonkin (Red.). New York: Mondial.
- Blanke, W. (2013). *Pri terminologia laboro en Esperanto: Elektitaj publikaĵoj*. New York: Mondial.
- Boulton, M. (1962). *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto*. La Laguna: Régulo.
- Caligaris, I. (2016). *Una lingua per tutti, una lingua di nessun paese: Una ricerca sul campo sulle identità esperantiste*. Ariccia: Aracne.

- Caligaris, I. (2021). *Unu lingvo por ĉiuj, unu lingvo de neniu lando: Surkampa esploro pri la esperantaj identecoj*. Pisa: Edistudio.
- Chrdle, P. (2019). *Sen laco por paco: Vivo kaj verko de Bertha von Suttner*. Dobřichovice: Kava Pech.
- Collinson, W. E. (2019). *La homa lingvo / Human language*. A. Tellier, & W. Jansen (Red.). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Couturat, L., Leau, L. (1903). *Histoire de la langue universelle*. Paris: Hachette.
- Couturat, L., Leau, L. (1907). *Les nouvelles langues internationales*. Paris: Hachette.
- Drezen, E. (1931). *Analiza historio de la Esperanto-movado*. Leipzig: EKRELO.
- Eco, U. (1993). *La ricerca della lingua perfetta nella cultura europea*. Roma / Bari: Laterza.
- Eco, U. (1996). *La serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo*. D. Mistretta (Trad.). Pisa: Edistudio.
- Englert, M. (Red.). 2020. *Hector Hodler: Une posture pacifiste / Pacisma sinteno*. Geneva: Notari.
- Fians, G. (2021). *Esperanto revolutionaries and geeks: Language politics, digital media and the making of an international community*. Cham / London / New York: Palgrave Macmillan.
- Fians, G. (2022). Kontraŭ la esceptismo de Esperanto(logio): Unuapaŝa etnografia aliro al tiu studkampo. *Esperantologio / Esperanto Studies* 3(11), 108–131.
- Fiedler, S., Brosch, C. R. (2022). *Esperanto: Lingua franca and language community*. Amsterdam: John Benjamins.
- Forster, P. G. (1982). *The Esperanto movement: Contributions to the sociology of language*. The Hague: Mouton.
- Galor, Z., Pietiläinen, J. (2015). *UEA en konscio de esperantistoj*. Dobřichovice: Kava-Pech.
- Garvía, R. (2015). *Esperanto and its rivals: The struggle for an international language*. Philadelphia: University of Pennsylvania Press.
- Gordin, M. D. (2015). *Scientific Babel: How science was done before and after global English*. Chicago: University of Chicago Press.
- Gubbins, P. (Red.). (2012). *Star in a night sky: An anthology of Esperanto literature*. London: Francis Boutle.
- Hastings, A. (1997). *The construction of nationhood: Ethnicity, religion and nationalism*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Hobsbawm, E., Ranger, T. (Red.). (1983). *The invention of tradition*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Hodler, H. (2020). *Homo – Hector Hodler: Articles dans La Voix de l'Humanité / Die Menschheit*. La Chaux-de-Fonds: CDELI.

- Holzhaus, A. (1969). *Doktoro kaj lingvo Esperanto*. Helsinki: Fondumo Esperanto.
- Hultgren, A. K., Gregersen, F., Thøgersen, J. (Red.). (2014). *English in Nordic universities: Ideologies and practices*. Amsterdam: John Benjamins.
- Janton, P. (1988). *Esperanto: lingvo – literaturo – movado*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Janton, P. (1993). *Esperanto: Language, literature, and community*. H. Tonkin (Red.). H. Tonkin, J. Edwards, & K. Johnson-Weiner (Trad.). Albany, NY: State University of New York Press.
- Jespersen, O. (1962). *Selected writings*. London: Allen and Unwin.
- Kalocsay, K. (1931). *Lingvo, stilo, formo*. Budapest: Literatura Mondo. [Represita, kun korektoj, Osaka: Pirato, 1970].
- Kalocsay, K. (1938). *La gramatika karaktero de la Esperantaj radikoj*. Budapest: Literatura Mondo. [Represita *American Esperanto Magazine*, Okt.-Dec.1965; Saarbrücken: Iltis 1980].
- Kalocsay, K. (1966). *Vojaĝo inter la tempoj*. La Laguna: Régulo.
- Kalocsay, K. (1934 [1979]). Esperantologio. En L. Kökény, & V. Bleier (Red.). *Enciklopedio de Esperanto*. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio.
- Kalocsay, K., Waringhien, G. (1932). *Parnasa gvidlibro*. Budapest: Literatura Mondo. [2a kompletigita eldono, kun Roger Bernard. Varsovio: PEA & Heroldo de Esperanto, 1968].
- Kalocsay, K., Waringhien, G. (1935). *Plena analiza gramatiko de Esperanto*. Budapest: Literatura Mondo.
- Kimura, G. C. (2005). *Gengo ni tutte "jin-i-sei" towa nanika?* [Kion signifas "artefariteco" en lingvo? Kazostudoj de la kornvala kaj soraba kiel ekzemploj de lingvokonstruado kaj lingva ideologio]. Tokyo: Sangensha.
- Kimura, G. C. (2010). La kornvala kaj Esperanto: Entreprenoj similaj? En D. Blanke, & U. Lins (Red.). *La arto labori kune* (p. 171-177). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Kimura, G. C. (2012). Esperanto and minority languages: A sociolinguistic comparison. *Language Problems and Language Planning*, 36(2), 167-181.
- Kirsch, A. (2016). *The global novel: Writing the world in the 21st Century*. New York: Columbia Global Reports.
- Kiselman, C. (2008). Esperanto: Its origins and early history. En A. Pelczar (Red.). *Prace Komisji Spraw Europejskich PAU, Tom II* (p. 39-56). Krakow: Polska Akademia Umiejętności.
- Kiselman, C. (2009). La evoluo de la pensado de Zamenhof pri religioj kaj la rolo de lingvoj. En C. Kiselman (Red.). *Religiaj kaj filozofiaj ideoj de Zamenhof: Kultura kaj socia fono. Aktoj de la 32-a Esperantologia Konferenco, Bjalistoko, 2009* (p. 39-61). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

- Kiselman, C. (2010). Hilelismo, homaranismo kaj neŭtrale-homa religio. En D. Blanke, & U. Lins (Red.). *La arto labori kune* (p. 401-414). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Kiselman, C. (Red.). (2018). *Aliroj al Esperanto*. Dobřichovice: Kava-Pech.
- Konishi, S. (2013). Translingual world order: Language without culture in Post-Russo-Japanese war Japan. *Journal of Asian Studies*, 72(1), 91-114.
- Konishi, S. (2015). The science of symbiosis and linguistic democracy in twentieth-century Japan. *Interdisciplinary Description of Complex Systems*, 13(2), 299-317.
- Korĵenkov, A. (2011). *Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof*. Kaliningrad: Sezonoj / Kaunas: Litova Esperanto-Asocio.
- Koutny, I., Stria, I., Farris, M. (Red.). (2020). *The role of languages in intercultural communication*. Cross-linguistic and cross-cultural Studies 1. Poznań: Wydawnictwo Rys.
- Koutny, I., Stria, I., Farris, M. (Red.). (2021). *The intercultural role of Esperanto*. Cross-linguistic and cross-cultural Studies 2. Poznań: Wydawnictwo Rys.
- Kováts, K. (Red.). (2020). *Manlibro pri instruado de Esperanto*. Rotterdam: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.
- Künzli, A. (2006). *Universalaj lingvoj en Svislando*. La Chaux-de-Fonds: SES & CDELI.
- Künzli, A. (2010). *L. L. Zamenhof (1859-1917): Esperanto, Hillelismus (Homaranismus) und die "jüdische Frage" in Ost- und Westeuropa*. Wiesbaden: Harrassowitz.
- Lapenna, I., Lins, U., Carlevaro, T. (1974). *Esperanto en perspektivo: Faktoj kaj analizoj pri la Internacia lingvo*. London / Rotterdam: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo.
- Lins, U. (2007). Esperanto oder das Dilemma des Dr. Zamenhof. En G. Dachs (Red.). *Sprachen. Jüdischer Almanach des Leo Baeck Instituts* (p. 127-140). Frankfurt: Jüdischer Verlag im Suhrkamp Verlag.
- Lins, U. (2008a). Esperanto as language and idea in China and Japan. *Language Problems and Language Planning*, 32(1), 47-60.
- Lins, U. (2008b). *Utila estas aliĝo: Tra la unua jarcento de UEA*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Lins, Ulrich. (2016a). *La danĝera lingvo: Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto*. Reviziita eldono. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Lins, U. (2016b). *Dangerous language: Esperanto under Hitler and Stalin*. London: Palgrave Macmillan.
- Lins, U. (2017). *Dangerous language: Esperanto and the decline of Stalinism*. London: Palgrave Macmillan.

- Maimon, N. Z. (1978). *La kaŝita vivo de Zamenhof*. Tokyo: Japana Esperanto-Instituto.
- Meysmans, J. (1911). Une Science nouvelle. *Lingua Internationale* 1(8), 14-16.
- Minnaja, C. (2018). *Historio de la Akademio de Esperanto*. Milano: Itala Esperanto-Federacio.
- Minnaja, C., Silfer, G. (2015). *Historio de la esperanta literaturo*. La Chaux-de-Fonds: Literatura Foiro.
- Miyamoto, M. (1977). *Historieto de la japana Esperanto-movado*. Osaka: KLEG.
- Moret, S. (Red.). (2019). *Interlinguistique et espérantologie*. Cahiers de l'ILSL, 61. Lausanne: Université de Lausanne.
- O'Keeffe, B. (2021). *Esperanto and languages of internationalism in revolutionary Russia*. London: Bloomsbury.
- Phillipson, R. (2004). *Ĉu nur-angla Eŭropo?* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Pool, J., Fettes, M. (1998). The challenge of interlingualism: A research invitation. *Esperantic Studies*, 10, 1-3.
- Privat, E. (1920). *Vivo de Zamenhof*. London: Brita Esperanto-Asocio.
- Privat, E. (1923). *Historio de la lingvo Esperanto: Deveno kaj komenco, 1887-1900*. Leipzig: Ferdinand Hirt.
- Privat, E. (1927). *Historio de la lingvo Esperanto: La movado, 1900-1927*. Leipzig: Ferdinand Hirt.
- Puškar, K. (2015). Esperanto (s)en perspektivo? Croatian Esperantists on the international language Esperanto. *Interdisciplinary Description of Complex Systems*, 13(2), 322-341.
- Rašić, N. (1994). *La rondo familia: Sociologiaj esploroj en Esperantio*. Pisa: Edistudio.
- Salomone, R. (2022). *The rise of English: Global politics and the power of language*. Oxford / New York: Oxford University Press.
- Schor, E. (2015). *Bridge of words: Esperanto and the dream of a universal language*. New York: Metropolitan Books / Henry Holt.
- Shenton, H. N., Sapir, E., Jespersen, O. (1931). *International communication: A symposium on the language problem*. London: Kegan Paul, Trench, Trubner & Company Limited.
- Stocker, F. (1996). *Wer spricht Esperanto?: Analyse der Esperanto-Bewegung in Deutschland unter soziodemographischen, verbandspolitischen und soziokulturellen Aspekten / Kiu parolas Esperanton?: Analizo de la Esperanto-movado en Germanio laŭ soci-demografiaj, asoci-politikaj kaj soci-kulturaj aspektoj*. München / Newcastle: LINCOM Europa.
- Sutton, G. (2008). *Concise encyclopedia of the original literature of Esperanto*. New York: Mondial.

- Tonkin, H. (2006). *Lingvo kaj popolo: Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Tonkin, H. (2012). Esperanto poetry. En R. Greene (Red.). *The Princeton encyclopedia of poetry and poetics* (p. 457-458). Princeton: Princeton University Press.
- Tonkin, H. (2013). Traduko kaj originalo en la Esperanto-literaturo. *Beletra Almanako*, 7(17), 75-84.
- Tonkin, H. (2020). *Memoru ĉi praulojn: Eseoj pri Esperanto-literaturo*. New York: Mondial.
- Tonkin, H. (Red.). (2015). Language and equality, Special Issue of LPLP. *Language Problems and Language Planning*, 39(3).
- Van Dijk, Z. (2012). *Historio de UEA*. Partizánske: Espero.
- Vilborg, E. (1989-2001). *Etimologia vortaro de Esperanto, 5 volumoj*. Malmö: Eldona Societo Esperanto.
- Wandel, A. (2015). How many people speak Esperanto? Esperanto on the Web. *Interdisciplinary Description of Complex Systems*, 13(2), 318-321.
- Wennergren, B. (2005). *Plena manlibro de esperanta gramatiko, Unua eldono*. El Cerrito: Esperanto League for North America.
- Wennergren, B. (2020). *Plena manlibro de esperanta gramatiko*. Partizánske: E@I.
- Wüster, E. (1978). *Esperantologiaj studoj*. Antverpeno: TK; La Laguna: Stafeto.
- Young, R. J. C. (2016). That which is casually called a language. *PMLA*, 131(5), 1207-1221.

Institucioj kaj aliaj utilaj retejoj

Aŭstria Nacia Biblioteko: <https://www.onb.ac.at/de/>

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj:
<https://interlingvistiko.net/>

Esperantic Studies Foundation: <https://www.esperantic.org>

Gesellschaft für Interlinguistik: <http://www.interlinguistik-gil.de>

Informilo por Interlingvistoj: <http://interlingvistiko.net/interlingvistiko/>

Tekstaro de Esperanto: <http://tekstaro.com/>

Pri la aŭtoro

Humphrey Tonkin estas emerita profesoro pri humanecaj studoj kaj emerita prezidanto de la Universitato de Hartford, Usono. Li magistriĝis en la Universitato de Kembriĝo kaj doktoriĝis ĉe la Universitato Harvard. Li estis

prezidanto de UEA (1974-1980, 1986-1989), dum multaj jaroj direktoro de CED, direktoro de ESF kaj ĉefredaktoro de LPLP.

Retadreso: tonkin@hartford.edu

About the author

Humphrey Tonkin is emeritus professor of humanities and president emeritus of the University of Hartford, USA. He holds an MA from Cambridge University and a Ph.D. from Harvard. He was president of the Universal Esperanto Association (1974-1980, 1986-1989) and for many years director of CED, of ESF and editor-in-chief of LPLP.

Sobre o autor

Humphrey Tonkin é professor emérito de Humanidades e reitor emérito da Universidade de Hartford, EUA. Ele é mestre pela Universidade de Cambridge e doutor por Harvard. Tonkin foi presidente da Associação Universal de Esperanto (1974-1980, 1986-1989) e foi, por muitos anos, diretor do CED, da ESF e editor-chefe da revista LPLP.

Esperanto: Research priorities

Abstract: Esperantology, the study of the phenomenon Esperanto, at first dealt primarily with the language. But Zamenhof, the initiator of Esperanto, created, with the help of the first Esperantists, not only a language but also a community with accompanying cultural and historical values. As a result, and in parallel with the expansion of the Esperanto movement, the field of Esperantology gradually grew to include history, social movements, literature and other fields, including Zamenhof's life and ideas. Interlinguistics, the comparative study of the linguistic conditions for a universal or international language, remained primarily linguistics-based and was linked with the abundant projects for an ideal world language or auxiliary language. Today, Esperantology has its own institutions and its own approaches to the phenomenon Esperanto, including not only linguistics, but sociolinguistics, ethnography, history, literature and numerous other subjects, including the development of the written and spoken language over more than 130 years. The present article offers a brief overview of Esperantology and its branches and proposes priorities for the future. If the field has grown broader and richer, none the less its penetration into the various disciplines remains insufficient: Esperantology must also turn outwards.

Keywords: Esperantology; Interlinguistics; Social movements; Literature; Zamenhof.

Esperanto: Prioridades de pesquisa

Resumo: Esperantologia – o estudo do fenômeno esperanto – inicialmente se ocupou de pesquisar a língua. No entanto, Zamenhof – o iniciador do esperanto – criou, com a ajuda dos primeiros esperantistas, não apenas uma língua, mas também uma comunidade com valores culturais e históricos intrínsecos. Como resultado, e em paralelo com a expansão do movimento esperantista, o campo da Esperantologia progressivamente cresceu, vindo a incluir história, movimentos sociais, literatura e outros campo, incluindo o estudo da vida e das ideias de Zamenhof. Interlinguística – o estudo comparativo das condições linguísticas de existência de uma língua universal ou internacional – continua se baseando essencialmente em discussões linguísticas ligadas aos inúmeros projetos por uma língua mundial ou auxiliar ideal. Atualmente, a Esperantologia tem suas próprias instituições e abordagens ao fenômeno esperanto, incluindo não apenas a linguística, mas também a sociolinguística, a etnografia, a história, a literatura e diversos temas, incluindo o estudo do desenvolvimento da língua escrita e falada ao longo de mais de 130 anos. Este artigo propõe uma visão panorâmica da Esperantologia e de suas ramificações, além de sugerir prioridades para o futuro. Apesar da crescente riqueza e vastidão deste campo, sua presença em meio a outras disciplinas permanece insuficiente: esperantólogos também devem ir para além dos limites do próprio campo.

Palavras-chave: Esperantologia; Interlinguística; Movimentos sociais; Literatura; Zamenhof.